

Karaj legantoj,

Finiĝis la jaro 2018. Kion ni faris en ĝi kaj kion ĝi faris al ni?

En 2018 finiĝis la mandato de la estraro de Kroata Esperanto-Ligo kaj en junio dum la jarkunveno estis elektita la nova Estraro kiu gvidu KEL ĝis la jaro 2020. La ĝisnuna prezidanto **Anto Mlinar** transdonis la taskojn de la prezidanto al **Spomenka Štimec**.

La nova estraro de KEL:

Spomenka Štimec, prezidantino

Vera Roknić, sekretariino

Vicprezidantoj: **Boris Di Costanzo**, **Davor Klobučar**, **Judita Rey Hudeček**

Membroj: **Ankica Jagnjić**, **Siniša Dvornik**, **Grozdana Grubišić - Popović**, **Robert Milijaš**, **Anto Mlinar**, **Dalibor Šeatović**.

Laŭ la konkludo de la Asembleo kaj decido de la Estraro estis decidite ke la renovigaj laboroj en nia ejo en Vodnikova startu en junio 2018 kaj ke ili ne superu la ekvivalenton de 9.000 eŭroj. Konforme al la decidoj, sur la surfaco de 30 m² estis aranĝita sendependa apartamento. Ĉar **Zagrebo** en la lastaj jaroj fariĝis tre ŝatata celo de turismaj vojaĝoj, la estraro de KEL planas ludonadi ĝin al turistoj. Turisma agado ne estas parto de nia statuta taskaro, sekve estis decidite ke la apartamento nomota ESPERA estu ludonata al la firmao Izvori de nia membro **Damir Mikuličić** (kaj lia edzino **Slavica Štefić** kaj filo **Filip Mikuličić**, membro de Studenta Esperanto-Klubo). Izvori ne estas nur la konata zagreba eldonejo, ĝi estas registrita ankaŭ por turisma agado. En decembro 2018 estis finitaj la konstrulaboroj kaj ekipado de la apartamento, kiun gvidis **Slavica Štefić** kun **Filip Mikuličić**. **Damir Mikuličić** prizorgis la taskojn de la registriĝo de la ejo. La urba komisiono pri registro de la ejo estas atendata en januaro 2019. La ĝisnunan laboron financis pluraj niaj membroj dum kelkaj pruntis monon por fino de la laboro.

La estraro de KEL decidis enloĝiĝi al la nova adreso, al du ĉambroj en amplekso de 53 m². Deko da membroj transportis nian bibliotekon kaj arkivon, kvindeko da membroj venis viziti la novan ejon. Membroj de Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** solene malfermis la novajn ejojn la 16an de novembro 2018. En januaro estas planata renkontiĝo de sponsoroj, kunsido de la membroj de Kroata Fervoja Esperanta Asocio, kunsidos Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** ktp...

En majo Esperanto-Societo „Trixini“ el Hrašćina gastigis kadre de sia „meteorita festo“ la prestiĝan reĝisoron **Branko Ivanda**, kiu prezentis sian novan dokumentan filmon pri la kroata kaj usona pentristo **Maksimilijan Vanka**.

Someraj vojaĝoj gvidis nin al la Universala Kongreso de Esperanto en la bela **Portugalia**, kie deko da esperantistoj ĝuis kaj kontribuis al la programoj de UK, ekz. **Spomenka Štimec** kaj **Božidar Brezinščak Bagola** prelegis omaĝe al la centjariĝo de la unua libro de la posta Nobelpremiito **Ivo Andrić** „Ex Ponto“ finverkita en Krapina en 1918. **Boris Di Costanzo** Partoprenis en la kongreso de italaj esperantistoj. **Ankica Jagnjić**, **Roža Brletić-Višnjić** kaj **Neven Kovačić** partoprenis en **Kragujevac** la kongreson de SAT, **Zlatko Hinšt** partoprenis en **Wroclaw** la ĉijaran IFEF-kongreson. (Raportas **Ankica Jagnjić**)

En julio Zagrebo gastigis Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj sur **Sljeme** en Tomislavov dom. La urbo **Zagrebo** finance helpis per 5000 kn por ke junaj zagrebaj esperantistoj helpu al la kongreso.

En septembro startis la regulaj ĉiumonataj prelegoj en Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ en nia ejo en la strato Knez Mislav kaj la ĉiusemajnaj prelegoj de fervojistoj-esperantistoj en la ejoj de KFEA. **Mila Bečka** organizis Esperanto-Kurson en Velika Gorica.

En oktobro en la librofoiro en **Padova** estis prezentita la itala traduko de la romano de **Spomenka Štimec** „Ombro sur interna pejzaĝo“. La italigon prizorgis **Carlo Minnaja** kaj **Giulio Cappa**.

Dum la tuta jaro evoluis la 9-landa projekto „Multlingva akcelilo“, kiun iniciatis **Zlatko Tišljar** kaj gvidas li kun **Maja Tišljar**. La kroataj partneroj estas la firmao Izvori kaj la zagreba Elementa lernejo **Retkovec**. La EU-programo Erasmus plus subtenis la dujaran projekton per 250.000 eŭroj.

El niaj kluboj la plej gravajn atingojn realigis **Bjelovar**.

Josip Pleadin, en la rolo de prezidanto de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, riĉigis la jaran esperantan programon en **Zagrebo** per serio da prelegoj pri la forgesitaj samideanoj. **Marija Belošević** en novembro okazigis programon omaĝe al **Lucija Borčić** en Biblioteko **Bogdan Ogrizović**.

La urbo **Zagrebo** disponigis al ni senpage la ejon de Zagreba Pupteatro, kie ni festis nian 110-jariĝon la 2-an de novembro 2018. **Davor Klobučar** preparis komputilan bild-prezentadon pri nia 110-jara agado, tra la programo gvidis **Ankica Jagnjić** kaj **Đivo Pulitika**. Kantis **Neven Mrzlečki** kaj solistinoj de la virina koruso „Ezerki“. Pri la evento raportis Kroata radio.

Decembre dek ŝoforoj el nia membraro engaĝis sin por transporto de nia biblioteko kaj de aliaj niaj posedaĵoj al la nova adreso en Vodnikova 9. Helpis kvin studentoj de Studenta Esperanto-Klubo.

La jaron ni finis en Biblioteko „Bogdan Ogrizović“ la 12an de decembro per omaĝo al Zamenhof. **Zlatko Tišljar** prezentis „Multlingvan akcelilon“ kun la partnerinoj el Elementa lernejo **Retkovec** **Sonja Burić** kaj **Marina Samoščanec**. Kantis **Neven Mrzlečki**. **Robert Milijaš** kaj **Juraj Drnjević** el SEK okazigis kvizon pri Esperanto. La plej multan scion montris **Faruk Islamović**.

En la lasta semajno de la jaro 2018 forlasis Esperantujon la islanda esperanta poeto **Baldur Ragnarsson**, kandidato por Nobelpremio por literaturo. Ni omaĝas al li per publikigo de lia poemo.

Dum la jaro ni perdis tre valorajn membrojn **Emilija Obradović**, **Dinka Šimunić** kaj **Boris Čović**.

Al ĉiuj koran dankon!

Feliĉan Kristnaskon! Fruktonon jaron 2019!

S. Štimec